
# BULTENO

de GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung deutscher Eisenbahner - Esperantisten im Bundesbahn - Sozialwerk

Fondita 1952 Numero 2 Marto/Aprilo/Majo 1982


## 26. Jahresversammlung in Friedberg/Hessen




Ansicht der mittelalterlichen Stadt Fri(e)dberg

# GEFA tagt im herbstlichen Friedberg

**Vom 15. bis 17. Oktober 1982 ist das reizvolle Friedberg (Hessen) gastgebende Stadt für die Teilnehmer der 26. Jahresversammlung der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten (GEFA). Wiederum wird während dieses Wochenendes ein reichhaltiges Programm geboten, das seine Anziehungskraft auf die Mitglieder der Vereinigung und ihre ausländischen Gäste sicher nicht verfehlen wird.**

Von Frankfurt, Gießen und Hanau erreicht man Friedberg in etwa einer halben Stunde. Schon von weitem grüßt der 55 Meter hohe Adolfsturm, das Wahrzeichen der einst befestigten Reichsstadt. Er steht auf historischem Boden. Vor 2000 Jahren eroberten die Römer die germanische Befestigung auf dem Friedberger Burgberg und errichteten ein Kastell, das nach der Wiedereroberung durch Germanen und Franken bis in das 19. Jahrhundert eine eigenständige Rolle spielte. Der heutige Burgkomplex mit Renaissance-Schloß läßt den Zustand um etwa 1500 erkennen.

Im Mittelalter entwickelte sich die freie Reichsstadt zu einem bedeutenden Messeplatz. Die gotische Stadtkirche, einige Bürgerhäuser unnd das Judenbad erinnern an die wirtschaftliche Blüte. Nach Kriegswirren und wirtschaftlichem Niedergang begann mit dem Bau einer Eisenbahn ein erneuter Aufstieg. Im Jahre 1850 wurde das Rosentalviadukt, auch 24 Hallen genannt, nach römischem Vorbild fertiggestellt. Es wird demnächst einer modernen Eisenbahnbrücke weichen, vielleicht jedoch für die Nachwelt erhalten bleiben. Friedberg stellt sich heute als moderne Stadt dar, die auf ihre historischen Bauten wie auch auf ihre neuzeitlichen Einrichtungen stolz sein kann.

Einige Informationen zum gedachten Ablauf der Tagung: Die Bezirksbeauftragten verteilen wie üblich die Anmeldevordrucke mit den Zimmer-Bestellkarten, die an den Bba Kiefer, BSA Ffm, AA 341 zurück erbeten werden. Am Bahnhof Friedberg ist neben dem Empfangsgebäude vom Freitag mittag bis Samstag mittag eine Empfangsstelle eingerichtet, die die Tagungsunterlagen aushändigt. Alle Veranstaltungen der Jahresversammlung finden in der Stadthalle statt, etwa 20 Minuten vom Bahnhof entfernt. Die meisten Teilnehmer können in der Nähe untergebracht werden.

Die Tagung beginnt am Freitag vormittag mit einer Pressekonferenz. Gleichzeitig wird im Foyer der Stadthalle eine Esperanto-Ausstellung eröffnet. Am Abend trifft man sich zum gemütlichen Zusammensein. Der Samstag vormittag ist der Stadtbesichtigung gewidmet, während sich die Delegierten auf ihrer Arbeitssitzung mit organisatorischen Problemen befassen. Nach dem gemeinsamen Mittagessen beginnt eine Busfahrt in den Taunus.

Ziel ist der Hessenpark, ein Freilichtmuseum mit wieder errichteten Fachwerkbauten, die einen Einblick in das bäuerlich-handwerkliche Leben der vergangenen Jahrhunderte bieten. Natürlich ist auch eine Kaffeepause vorgesehen.

Den Höhepunkt des Wochenendtreffens stellt der Festabend dar, auf dem auch Prominente der DB, des BSW und des öffentlichen Lebens vertreten sind. Nach den kulturellen Darbietungen wird zum Tanz gebeten. Bei der Matinee am Sonntag werden voraussichtlich mit einem Film Erinnerungen an den 34. IFEF-Kongreß in Ungarn geweckt. Noch einmal nehmen die Teilnehmer ein gemeinsames Essen ein, ehe sie wieder die Rückfahrt in ihre Heimatorte antreten. Vielleicht wird das Treffen wie in den meisten vorangegangenen Jahren von einem günstigen Herbstwetter begleitet. Jedenfalls ist es wichtig, daß möglichst viele an dieser Veranstaltung teilnehmen, damit die Öffentlichkeit über unsere Tätigkeit und Ziele unterrichtet wird und wir den Kontakt mit unseren Esperanto-Freunden vertiefen können. Auf Wiedersehen in Friedberg!

**W. B.**

---

**Sprachprüfung**

Während der Jahresversammlung in Friedberg wird wiederum Gelegenheit zum Ablegen der Sprachprüfung in Esperanto geboten. Interessenten werden gebeten, sich baldmöglich mit dem Beauftragten, Herrn Lautenbach, Abtstor 21, 6400 Fulda (Dienstanschrift: 6400 Bf Fulda, II) in Verbindung zu setzen.

**Lingva Angulo**
## KVAR OFTAJ ERAROJ

Sub influo de siaj naciaj lingvoj eĉ tre bonaj sciantoj de Esperanto, inkluzive verkistojn kaj redaktorojn de periodaĵoj, konstante faras sufiĉe multajn erarojn, facile eviteblajn. Jen nur kvar el ili:

1. **Mank/i.** — Oni povas legi, precipe en tekstoj de hispanlingvanoj, „mankas homoj**n**, rimedoj**n**, spaco**n**" ktp. **Mank/i** estas netransitiva verbo. Estas grava eraro uzi ĝin kiel transitivan. Sekve oni devas diri kaj skribi: mankas homoj, rimedoj, spaco, ktp.

2. **Oportun/a.** — Esperantistoj, kies hejma lingvo estas la angla, tre ofte uzas tiun vorton erare. Kvankam por la angla **opportune** oni povas en kelkaj kuntekstoj diri en Esperanto **oportuna,** tamen la angla **opportunity** signifas **okazo** aŭ **ŝanco,** nepre ne **oportuno**, kiel oni ofte legas kaj aŭdas.

3. **Skrib/i.** — En la kroata tiu ĉi verbo povas esti transitiva kaj netransitiva, fakte verbo de stato kiel en Esperanto la verbigitaj **pluvas, neĝas,** ks. Sekve en la kroata oni povas diri „skribi leteron" kaj „skribas en la letero, gazeto, libro" ktp. En Esperanto **skrib/i** estas transitiva kaj la formo **„skribas** en la letero, gazeto, libro" ktp., kiun uzas eĉ Radio Zagreb, estas grave erara. Por tiu sensubjekta senco oni devas uzi en Esperanto nur la adverban pasivan participon, do: estas skribite en la letero, libro, gazeto, ktp.

4. ... **ĝis ne.** — Sub influo de siaj respektivaj slavaj lingvoj, eble ankaŭ **de** aliaj, tre multaj esperantistoj el tiuj landoj ĉiam uzas **ĝis ne** anstataŭ **ĝis** ne nur en kazoj de negaciaj ĉefpropozicioj („mi ne manĝos ĝis vi **ne** venos"), sed ankaŭ **en** tiu de pozitivaj („mi legos ĝis vi **ne** revenos"). Eĉ Kabe skribis: „Mi ne kredos al viaj vortoj, ĝis vi **ne** donos pruvojn" (citita laŭ PIV). En Esperanto tio estas ne nur grava eraro, sed ankaŭ sensenca. **Ĝis** en Esperanto estas aŭ prepozicio, montra la punkton, kiun la ago atingas, aŭ subjunkcio, signifanta la finon de daŭra ago per montro de alia momenta ago (PIV). Sekve, oni devas diri: Mi ne manĝos, **ĝis vi venos;** mi legos **ĝis vi revenos;** mi ne kredos al viaj vortoj, **ĝis vi donos pruvojn.**

El „HORIZONTO" n-ro 6/1981

## Literatura Konkurso

Kiel konate, en la 33a IFEF-kongreso Regensburg ni okazigis Literaturan Konkurson. Granda kvanto de la ensenditaj kontribuaĵoj intertempe aperis kiel broŝuro „La Verda Relo". Ĉi-sube ni publikigas originale verkitan poemon, kiun ne entenas la menciita broŝuro.

### Fervojo

Fervojo ringe terglobon brakumas,
tra ĉiuj landoj
trakurante lumas.

Kunligas ilin per paco fruktodona
de l' lando glacia
ĝis lando suna.

Similas reloj al serpentoj arĝentaj,
floregan regionon
ritme kuradantaj.

Dank' al ili eblas
en Parizo matenmanĝi
en Berlino tagmanĝi
en Budapeŝto vespermanĝi.

Mallongigas distancojn fervojo,
nepelata per tradoj,

malgranda mondo sur la radoj
kun sia armeo da fervojistoj,

kiuj estas hejme ĉie
hodiaŭ ĉi tie
morgaŭ alie.

Vidante relojn mi ofte revis,
kien ili celas?

Respondi mi ne povis.
Sonĝe mi vidis malproksimecon,
nekonatajn landojn, homojn,
naturan belecon.

Kiel infano mi ofte demandadis:
Ĉu la trajno min ankaŭ forveturigos?
Sed kien? Mi demande diradis.
Al feliĉo silenta?
Al bela virino?
Al vivo kontenta?

Nun mi scias, ke mi estas en stacio cela
ke la vojo estis bela.

Jarke Pol
(Ĉeĥoslovakio)

La broŝuron „La Verda Relo", 56 paĝojn, bonvolu mendi ĉe s-ino Elfriede Kruse, Wiener Straße 121, D-6000 Frankfurt/M. 70, kaj samtempe ĝiru 15 GM al Sparda-Bank Frankfurt, poŝtĉekkonto 569 08 Frankfurt favore al Elfriede Kruse, konto 129 957.

**Werfenweng kaj Morzine – du Esperanto-skisemajnoj**

Amikoj de vintra feriado dum la monatoj Februaro kaj Marto 1982 povis elekti inter du skisemajnoj (aŭ partopreni en ambaŭ): de la 13a ĝis la 20a de Februaro en Werfenweng/Aŭstrio kaj de la 27a de Februaro ĝis la 6a de Marto en Morzine/Francio.

Al la montara regiono de Bischofshofen jam tradicie invitis la fervojista Esperanto-sekcio Linz kaj ges-roj Geroldinger zorgis por gajega etoso en tia abundo, ke vortoj apenaŭ povas tion priskribi. La domo ĉi-jare ne estis la kutima surmonta (ĝi forbrulis kaj nun estas rekonstruata) sed ĝuste apud la vala stacio de seĝolifto. Multe da muziko, kantado, karnavala-kostumado, societaj ludoj, skikonkurso, E-kurso, specialaj florbukedetoj pro la Valentina Tago – tio ja restos en la memoro de la kvardeko el tri landoj.

Post unusemajna paŭzo la nova vojaĝcelo fervoja nomiĝis Ĝenevo; de tie aŭtobuse trans la francan landlimon kaj 90 minutojn orienten tra la Alpoj de Savojo ĝis Morzine (en alteco de 1000 metroj). En kaj apud la loko funkciis tri skiterenoj atingeblaj post aŭtobusa veturado, per telferoj: Le Plenay (1546 m), Nyon (1500 m) kaj Avoriaz (1800 m) kun kurioz-stilaj lignodomegoj kaj senaŭtomobilaj vojoj. En „nia" domo Florimontane atendis unu surprizo post la alia, far de la Parizanoj estritaj de Gérard Horn, por la 80 IFES-anoj el 8 landoj: disdono de karnavalaj ĉapetoj (por viroj) kaj kolĉenoj (por inoj), de memfaritaj papersaketoj kun diversaj donacetoj, i. a. aerbalonetoj kaj karnavalaj paperbendoj; tri muzikistoj venis por la karnavala vespero, du aliaj por la adiaŭa vespero; teatra programo tutvespera kun pupoj, skeĉoj kaj ĥorkantado – ĉio en memfaritaj kostumoj; prezentado de filmoj kaj de diapozitivoj; komuna kantado kaj ludado; konkursoj por skiado, lingva konkurso, eĉ marŝada konkurso, premioj por ĉiuj el ili, kaj la IFEF-premio por la kombino el skiada kaj lingva konkursoj. Kaj kiaj menuoj!! Oni frandis ĉiutage, la ruĝvina bareleto en la manĝosalono estis ĉiam plena kaj laŭplaĉe je ĉies dispono! Eĉ fromaĝ-fandaĵo kaj fiŝsupo ne mankis sur la tablo – oni vivis „kiel Dio en Francio". Kion venontjare ni Germanoj faru dum la IFES 83?? Konkurenci ni certe ne povos . . .

**Ritt**

# Aus den Gruppen

**Essen:**
Unter reger Beteiligung unserer GEFA-Mitglieder hat der Esperanto-Kreis in der Rheinisch-Westfälischen Auslandsgesellschaft e.V., Dortmund, im 1. Vierteljahr 1982 folgende Veranstaltungen durchgeführt:

**11. 1.** Günter Bartz berichtete anhand von Dias, Zeitschriften und Dokumenten über den 33. IFEF-Kongreß in Regensburg

**25. 1.** Weiterbildungsabend unter dem Thema: Lusin kaj Esperanto.

**8. 2.** Hermann Behrmann, Diavortrag über den 66. Weltkongreß in Brasilien

**8. 3.** Zsuzsa Barcsay kaj Marianna, Vortrag über angeborene Mehrsprachigkeit

**22. 3.** Diskussionsabend mit Wolfgang Loose „La fundamento kaj lingvoevoluo"

Am **26. 4.** berichtet unser Mitglied Anneliese Köhler, Schwelm, über „Bekanntes und unbekanntes Venedig".

**Frankfurt/Main**
Die Clubabende finden jeweils am 3. Dienstag des Monats um 16.30 Uhr im Konferenzzimmer 117 des BSA (gegenüber Ffm Hbf, Treppenaufgang B-Ebene zur Karlstraße) statt.

Zur Esperanto-Konversation, Weiterbildung sowie Vorträgen und Reiseberichten mit Filmen und Dias wird herzlich eingeladen.

Zur Erlernung der Internationalen Sprache finden u. a. Wochenendseminare im Naturfreundehaus „Auf dem Steinberg", Oberer Steinberg 94, 6070 Langen, statt.

Auskunft und Anmeldung bei
Manfred Führer, Am Stadtpfad 11,
6236 Eschborn, Tel. 0 61 96 / 4 61 94.

---

**Nürnberg**
Am 22. 3. 1982 feierte die Esperanto-Gruppe Lichtenfels ihr 25jähriges Bestehen. Die Gründung erfolgte am 6. 2. 1957. Bereits im März 1956 wurde der 1. Anfängerkurs mit 40 Teilnehmern durchgeführt. Im Jahr darauf waren 35 Personen bereit die Internationale Sprache zu erlernen. Ab 1959 hat sich die Gruppe GEFA angeschlossen. Gruppenleiter Hans Müller, Lichtenfels, gab einen interessanten Überblick über die Entwicklung der Gruppe. Einmalig dürfte sein, daß in 25 Jahren nur das Ableben eines Mitgliedes zu bedauern war.

20 Mitglieder aus Coburg, Kronach und Lichtenfels verbrachten einige angeregte Stunden im vertrauten Freundeskreis.

Seit Anfang des Jahres werden wöchentlich je 1 Kurs in Coburg und Lichtenfels durchgeführt. Wir wünschen der Gruppe weiterhin erfolgreiche Arbeit.

**Vojaĝkalendaro**

Esperanto-societo Südharz en Herzberg aranĝos:

① Semajnfinajn kursojn en Herzberg, Grubenhagenstraße 8,
10a ĝis 12a de Septembro
kaj 12a ĝis 14a de Novembro 1982
en 4 lingvaj gradoj kaj

② Nordgermanajn Esperanto-tagojn inter la 24a kaj 26a de Septembro 1982 ankaŭ en Herzberg. El la programo: prelegoj de R. Schulz, kantoj en Esperanto de Jan St. Skorupski, balo, lotumado, nordgermana Esperanto-konferenco kaj junulara kunveno.

Petu informojn ĉe: Esperanto-societo Südharz, Grubenhagenstraße 8, 3420 Herzberg am Harz.

**Tutmonda Esperantista Adresaro 1981/82**

Enhavante ĉ. 2700 adresojn (kun indikoj pri naskiĝjaro, profesio, hobioj, grado de E-sciado, deziro korespondi, preteco gastigi) el ĉ. 60 landoj, jam ĉi tiu unua eldono de TEA estas la plej ampleksa esperantista adresaro. Tuj mendu ĝin ĉe via kutima libroservo aŭ ĉe Info-Servo, Bismarckstr. 28, D-3550 Marburg, F.R. Germanio. Prezo tie: 6,60 gmk + sendk.

**Diversaj**

SENPAGE vi ricevas ekz. de la riĉe ilustrita turisma revuo „La Migranto“. Skribu al: Liesel Nagel, Moosgrund 8, D-7800 Freiburg, FRGerm.

Adolf Burkhardt: Tero kaj Ĉielo kantu. Dediĉe al la KELI-kongnreso 1981.
80 p., 15x21 cm. Mimeo. (A. Burkhardt, D-7311 Bissingen an der Teck).
El: Heroldo 1/82

**60-a Germana Esperanto-Kongreso**

Münster/Westf. 28. – 31. Majo 1982
Petu programon kaj aliĝilon ĉe Willi aŭ Guido Brandenburg, Brinker Damm 24, 4404 Telgte 2.

**Neue Mitglieder aus den Gruppen**

**Essen**

Helmut Claus, BA Münster,
Heinz Otto Feldermann, Bf Mülheim (Ruhr) Hbf.
Karl-Heinz Lattemann, Bzk Dortmund, Betreuungsstelle,
Werner Radermacher, GPB West, Essen,

**München**

Adolf Hrazdil, Bf Augsburg Hbf
und Ehefrau Ulrike

**Nürnberg**

Dieter Preußer, Bf Coburg
begrüßen wir herzlich und hoffen auf gute Zusammenarbeit.

---

# Fervojaj Novaĵoj

**Bangladeŝo:**
**Modernigo de la fervoja reto**

La fervojoj de Bangladeŝo (BRB) planas efektivigi ĝis 1985 la modernigon de ĉ. 970 km el la reto de fervojaj linioj entute 2874 km longa. Samtempe oni volas ekkonstrui novan 52 km longan linion de Khulna al Mongla. Oni parolas ankaŭ pri antaŭurba ringa fervojo por la urbo Dacca. La linioreto de BRB konsistas el 1910 km kun metra ŝpuro kaj 964 km kun larĝa ŝpuro de 1676 mm. La BRB disponas ĉi-tempe pri 197 vapor- kaj 202 dizel-lokomotivoj. Ekde 1985 oni volas fini ankaŭ en Bangladeŝo la vaportrakcion. Sed antaŭe oni planas ampleksan modernigon de la tuta fervoja reto. Ĉefe favorata estos la renovigo de la trakoj, la aliigo de la linioj al elektra trakcio kaj la modernigo de signalilaj kaj telekomunikaj instalaĵoj.

**Francio:**
**Pli da pasaĝeroj en TGV**

La nova franca rapidega trajno TGV, kiu veturas de la 27a de Septembro 1981 sur parte novkonstruita linio inter Parizo kaj Liono, dum la unuaj dekkvin tagoj jam veturigis 180 000 pasaĝerojn. Se oni komparas tiun nombron kun la nombro de pasaĝeroj veturigitaj en la sama tempo de la pasinta jaro, tio estas pliigo je 70 %.

**Irlando:**
**Takta trafiko inter Howth kaj Dublino**

Jam ekde 1983 la Irlandaj Fervojoj (CIE) volos ekfunkciigi novan trafiksistemon por la persontrafiko sur la linio Howth/Bray –

Dublino. Estas antaŭvidite, ke dum la ĉefaj trafikhoroj la trajnoj veturu ĉiujn kvin minutojn. Dum la horoj, kiam veturas malpli da homoj, la trajnoj veturu nur ĉiujn dekkvin minutojn. Estas bezonataj tiucele 40 vagonaroj kun transportkapablo de 25 000 personoj hore. La Irlandaj Fervojoj intencas krome ligi al tiu ĉi sistemo ankaŭ la aŭtobus-liniojn kun koneksoj al la trajnstacioj Howth, Sutton, Raheny, Blackpool, Dun Laoghaire kaj Bray. Tiuj ĉi aŭtobuso-linioj kunligu la antaŭurbojn jam ne atingeblajn per trajnoj kun la trajnlinioj, kaj ili plimallongigu la veturadon de la homoj tien- kaj reen-veturantaj inter iliaj labor- kaj hejmlokoj.

**Ĉinio:**
**Nova kunliga fervojo**
Novan fervoj-linion 108 km longa kun 10 stacioj oni konstruis antaŭ kelka tempo inter la urboj Jining kaj Heze (provinco Ŝandong). Oni komencis la konstruadon jam fine de 1977. Per tiu ĉi nova linio estas farita ligo al la linioj Tianjin — Pukou kaj Yanzhou — Jining.

**Suomio (Finnlando):**
**Boĝioj por interŝanĝo ĉe la landlimo**
La malfacilaĵoj kaŭzitaj per la diferencaj ŝpurlarĝoj inter la reto de la Svedaj Ŝtatfervojoj (SJ) kaj tiu de la Suomiaj Fervojoj (VR) estu forigataj estonte per uzo de interŝanĝeblaj boĝioj ĉe la landlimaj stacioj Tornea/Haparanda. En Tornea la Suomiaj Fervojoj instalis tiucele portal-arganon kun portkapablo de 70 tunoj, kiu ebligas adapti la vagonojn de regula ŝpuro al larĝa ŝpuro kaj inverse. La procedo daŭras proksimume tridek minutojn.

**Aŭstrio:**
**Nun 3000 kilometroj elektrizitaj**
Per finkonstruo de la 46 km longa linio Tulln — St. Pölten la elektrizita parto de la reto de la aŭstriaj fervojoj atingis la longecon de precize 3 000 kilometroj. Per tio estas elektrizitaj 51,3 % de ĉiuj linioj, sur kiuj tamen funkcias 90 % de la tuta trafiko. Laŭ la programo, sankciita per la estraro de la Aŭstriaj Federaciaj Fervojoj (ÖBB), ankoraŭ estos ekipitaj por elektra trakcio ĝis aŭtuno 1985 la linioj Abdsdorf —Hippersdorf—Krems, Leopoldau—Wolkersdorf—Mistelbach kaj Krems—Herzogenburg.

**Francio:**
**Novaj persono-vagonoj ankaŭ por la dua klaso**
Por disponigi ankaŭ al siaj pasaĝeroj de la dua klaso pli da komforto, kiu korespondu proksimume al tiu de la vagonoj „Corail" kun meza irejo, la Francaj Ŝtatfervojoj (SNCF) mendis 200 vagonojn de nova konstru-serio, el kiuj la unuaj jam estas uzataj. Ĉiu vagono havas 88 sidlokojn. La allasita plej alta rapideco por tiuj veturiloj estas 160 km/h, sed ĝi povas esti plialtigita per negrandaj ŝanĝoj de la boĝioj al 200 km/h.

**Japanio:**
**„Unu-viro-trajnoj sur nova Ŝinkansen-linio**
Surbaze de interkonsento inter la fervojistaj sindikatoj kaj la fervoja administracio nun povas esti komencita la trajntrafiko sur la nova Tohoku — Joetsu-linio per vagonaroj gvidataj de nur unu persono. Per tio la kostoj de tiu ĉi norda Ŝinkansen-linio estas malpli altaj ol tiuj de la sudaj linioj al Osaka kaj Hakata, kie oni ankoraŭ bezonas du lokomotivestrojn kaj kvar konduktorojn por 16-vagona trajno.

**Turkio:**
**Nova fervoja ponto trans la riveron Eŭfrato**
La ponto trans la Eŭfraton inter la urboj Malatya kaj Elazig estos post la finkonstruo de reten-digo apud Karakaya la kvina plej granda de la mondo. Ĝi havos longon de 2400 m. Ĝiaj kostoj estas taksataj je 3,5 miliardoj da turkaj pundoj. La ponto estos transdonata al la trafiko jam dum la venonta jaro.

(Tradukis laŭ „Blickpunkt"
Manfred Retzlaff)

---

**Berichtigung:**
Anschriftenverzeichnis 1/1982, Seite 8:
Bba Essen Retzlaff, Bf 4740 Oelde, BSW-Fach,
Bba Köln BAmtm Herlitzc, Basa 943/3473,
BHS Barmaneter, Bf Memmingen, Basa 912/809/394.

---

**Redaktfino por n-ro 3/82 estas la 10.6.1982**

Herausgeber / eldonanto: Hauptvorstand des Bundesbahn-Sozialwerks, Frankfurt (Main). Schriftleitung / redakcio: Wilhelm Graß, 8620 Lichtenfels, Sachsenstr. 7. Druck / preso: Druckerei Friedrichs, 3420 Herzberg am Harz